



8-6-1974

CGC N^o
00406 504/1000-06

ABRIL 1982

Conselho Brasileiro de Esperanto

BRASÍLIA - DISTRITO FEDERAL

Sede: Edifício Jockey Clube, sala 103
Setor Comercial Sul

CORRESPONDÊNCIA PARA A SEDE

Edifício Jockey Clube, sala 103
Setor Comercial Sul - Brasília - (DF)
CEP 70.000

SECRETARIA

Caixa Postal 07 - 1182
Telefone 226-1298
70.000 - Brasília (DF)

BOLETIM INFORMATIVO

N^o 69

MONTEIRO LOBATO, LA HOMO KIU VEKIS UNU LANDON

Antaŭ cent jaroj (18-04-1882), en la urbo Taubaté - SP, naskiĝis la kreonto de nia porinfana literaturo kaj la instigonto de neforgeseblaj kampanjoj, kiuj vekis la nacian konsciencon de la popolo.

Diplomita en jurscienco, akuzisto en la urbeto Areias - SP, komerca ataŝeo de Brazilo en USONO, Monteiro Lobato ĉiam elstarigis pro siaj ideoj firmaĵoj kaj kuraĝaĵoj!

Lobato ne estis nur verkisto, kiu instruis al milionoj de brazilanoj la guston por la legado, sed unu el la plej aktivaj homoj de negocoj en sia tempo.



En lando sen ŝoseoj, sen industrioj, sen petrolo kaj sen feruzinoj, Lobato trovis taŭgan kampon por enŝovi sian inteligentecon de ĵurnalisto kaj verkisto. Dum sia universitata vivo, li akompanis kaj partoprenis la diskutojn ĉirkaŭ la plifirmigo de la Respubliko. Ekde tiam, en la rondo de junuloj, li elstarigis pro la energio de siaj kritikoj al la sociaj malbonaĵoj, al malkapableco de la administrantoj, kaj al la forgeso en kiu oni lasis la homojn kaj la komo-

numojn de nia internlando.

Dum longa periodo, Lobato centris sian atenton en du ĉefaj aferoj por la brazila ekonomio: la kreo de granda siderurgio kaj la ekspluatado de petrolo. Kun tiu-ĉi celo, li fondis kompanion kun la helpo de amikoj kaj de la popolo. La entrepreno badaŭrinde malsukcesis, pro manko de strukturo teknika kaj de registara apogo. Multaj personoj kritikis lin, pro la fiasko, precipe tiuj, kiuj ne volis la venkon de kiu ajn petrola entrepreno. Kiel respondo al tiuj kritikantoj, kiuj konsideris Lobato'n komunisto kaj vendita al eksterlandaj kapitalistoj, li eldonis en 1936 la libron "La Skandalo de l' Petrolo", unu el la plej viglaj akuzverkoj jam skribitaj en nia patrujo, kiu entenas detalan raporton pri ĉiaj malfacilaĵoj, kiujn li trovis en la vojo cele al la elfosado de petrolo en nia lando.

"Unu nacio fariĝis per homoj kaj libroj", plurfoje li diradis. Verŝajne, pro tio li fondis la eldonejon Monteiro Lobato & Cia. - Editores, kiu poste fariĝis Editora Monteiro Lobato, kiu revoluciis bazan sektoron de la nacia kultura vivo, kaj aliformigis la ĉefurbon San-Paŭlo en la plej grandan grafikan parkon de la lando.

Kiam li eldonis sian unuan verkon "Urupês", la libro estis aĉetebla en apotekoj, lernejoj, poŝtagentejoj, tio estas, kie ajn oni permesis al li instalati vitroŝankron aŭ standvendejojn. Per tiu vendo-sistemo, Lobato ankaŭ revoluciis la "marketing" de la libroj en Brazilo, en epoko kiam preskaŭ ĉio venis presita el Portugalujo.

Senlaca batalanto kontraŭ la malklereco kaj malkleruloj, iam li malsufokis sian malĝojon jene: "Skribi por plenaĝuloj ja naŭzas min. Bestoj malgraciaj. Sed por infanoj, unu libro esta

ADRESSANGO

Nia Prezidanto translokiĝis definitive al Ŝtato São Paulo. Pro tio, kunlaboraĵon por tiu ĉi Bulteno kaj leterojn por la Prezidanto oni sendu al tieŝ privata adreso, kiun ni mencias en la suba kadro de BKE-estraro.

BRAZILA KONSILANTARO DE ESPERANTO

Honora Prezidanto

Francisco de Souza Almada, Rua
Galeão Carvalhal 31, Ap. 73, BR
11100 - Santos-SP.

Estraro

Prezidanto: Carlos A.S. da Cunha,
Alameda dos Maruás 471, Planalto
Paulista, BR 04.068, São Paulo-SP

Vicprezidanto: Nelson P. de Souza
Caixa Postal 07-1182, BR 7000 -
Brasília-DF

Kasisto: José Carlos Dorini Ramos -
SHIN QI 02 - Cj. 08, Casa 15 BR
71500 - Brasília-DF

Sekretario: Fíno Lêda da Silva Ga-
ma, SOS 306-A-101, BR 70000 - Bra-
sília-DF

Kulturaj Aferoj: Walter A. Francini,
Rua Afonso Bandeira de Melo, 35,
Campo Belo, BR 04613, São Paulo-SP

Informa Bulteno

Oficiala organo de Brazila Konsilan-
taro de Esperanto

Aperas monate
Dissendo senpaga

Redaktoroj provizoraj: Carlos A. S.
Cunha kaj Nelson P. de Souza
Kunlaboraĵoj intelektaj estas bon-
venaj. La estraro, tamen, ne respon-
decas pri subskribitaj artikoloj.

*Kara Leganto: Cr\$ 1.200,00 estas la
kosto de BKE-jarkotizo 1982. Do, kion
vi atendas por fariĝi nia individua
membro?*

tuta mondo". Lobato, do, decidis verki por in-
fanoj pli ol dudek libroj. El ili ekaperas la ro-
luloj, kiuj ĝojigas la infanaron kaj plenkrekulojn
de la tuta mondo: Emília, Narizinho, Pedrinho,
Dona Benta, Tia Nastácia, Visconde de Sabugo-
sa, Marquês de Rabicó kaj aliaj.

Monteiro Lobato mortis la 4an de julio
1948, en São Paulo. Laŭ opinio de la verkistino
Ana Maria Machado, "la plej bona maniero festi
la centjaran naskiĝdaton de l'kreinto de Jeca
Tatu kaj de Sítio do Picapau Amarelo estas legi
liajn librojn (El O Estado de São Paulo, suple-
mento de 18-04-82; Revista Manchete, n-ro
1.567; kaj BIP - Banco do Brasil, n-ro 97).

Elportugaligis Berenice K. Eliot

ESPERANTAJ AMUZAĴOJ

José Saraiva Matos (BA)

AMUZ... HIBRIDAJOJ

Laŭ novaĵo ĵus alveninta el ESPE-
RANTUJO, la tieaj sciencaj esperantistoj
atingis grandan progreson en la studesplo-
rado pri hibridoj.

Ekzemple: Post krucigo de KAMELO
kaj LEONINO, ili ricevis alian novan spe-
con: KAMELEONO.

KAMELEONO: "Genro de lacertoi-
doj kun kolorŝanĝema haŭto".

ESPERANTISTO SCIAS ĈION...

- Ĉu vi scias kio estas MORTEZO?

- Jes, la TEZO pri MORTO.

MORTEZO: "Enĉizaĵo, ĝenerale pris-
moforma, farita en ligna aŭ metala peco
por samforma tenono de la kunigota pe-
co".

TEZO: "Aserto elmetata kaj defendata
de iu persono".

AER... MON... DIALOGETO

Astronaŭto: - Ĉu vi preferus dormi
sur AEROLITO?

Bankiero: - Ne, mi preferus dormi sur
MONOLITO.

AEROLITO: "Ŝtono falinta sur teron
el la etera spaco".

MONOLITO: "Laboro farita nur el
unu ŝtona bloko.

Rimarko: La ĝustajn difinojn mi elprenis
el PIV.



TRA LA MONDO

BELGIO

● La 1-an de aprilo, en Bruĝo, Belgio, okazis kelkhora renkontiĝo inter prof. d-ro Lapenna kaj s-ro Grégoire Maertens, prezidanto de EUA. Temis ĉefe pri provo kunordigi la agadojn rilate la Jubileon Jaron 1987. Tiurilate estas interkonsentite, ke la 30an de majo ĉi-jare en Münster (FR Germanio) okazu kunveno de reprezentantoj de ĉefaj internaciaj Esperanto-organizaĵoj. Aparta invitilo (kun tagordo) estas dissendita por tiu kunveno, kiu okazos en la kadro de la 60a Germana Esperanto-Kongreso (28a-31a de majo).

● La Estraro de EUA aprobis, ke en la Internacia Kongresa Universitato (67a UK) prelegos dekunu konferencistoj, el kiuj tri estas virinoj, kaj ke la 11 prelegontoj venas el 10 malsamaj landoj.

HISpanUJO

● Futbalo kaj Esperanto - La plej ofta internacia gazeto de la E-Movado, Heroldo de Esperanto, informis pri la fondiĝo de Esperanto-oficejo en Barcelono, kunlige kun la Mondaj Futbalaj Ĉampionludoj. Tie estis decidite, ke en ĉiu hispana urbo, kie okazos la ludoj kaj kie ekzistas E-grupoj, oni starigos specialan informan oficejon. La respektivaj grupoj jam kontaktis la koncernajn sportajn instancojn kaj informis letere ĉiun E-asocionkies nacia teamo partoprenos la ludojn. Pliajn detalojn oni petu al Hispana Esperanto-Federacio, Dos de Mayo 4, Valladolid 4 - Hispanujo.

● INTERNACIA SPORTA SEMINARIO organizata de Madrida E-Liceo (Atocha 98, 4^a, Madrido 12, Hispanio), pri kiu ni jam raportis, nun informas ke Reĝo Juan Carlos I transprenis la prezidantecon de la Honora Komito, al kiu aliĝis ankaŭ du Ministroj kaj eminentaj reprezentantoj de la hispana publika vivo.

BRITIO

● LONDONO VOKAS - Grava 132-paĝa verko de s-ano Harry Holmes, eldonita de Londona E-Klubo, kiun oni fondis jam en 1903 kaj inter kies klubanoj estas kelkaj el la plej gravaj esp-istoj en la historio de la Movado. Ĝi estas vere modela klubo, kiu plene pravigas la iaman profetan diradon de Zamenhof: "Potenca voko iras el Londono kaj ĉiam pli kaj pli sonados kaj resonados en ĉiuj partoj de la mondo". Estraranoj de ĉiuj E-Klubo devas sekvi ties modelon, pri kiu oni povas legi: 1) "Ofte, alilandanoj esprimis envion pri la kvalito kaj diverseco de la eroj (de ĝia programo)"; 2) "La dediĉita laboro de generacioj de volontuloj ebligis la senĉesan funkciadon de la klubo, eĉ dum la bombardado de Londono dum du mondaj militoj".

● STOKES-ON TRENT - La Urba Komunumo eldonis belan kaj interesan faldfolion okaze de la 66^a UK. Petu senpage al: Town Clerk, Town Hall, Old Stoke, otke-on-Trent, ST4-IHH, Anglio.

JAPANUJO

● Riĉiĝis la beletro en Japanujo, pro reapero dum tiu ĉi monato de la literatura revuo "L'Omnibuso", kiu prenis novan titolon: "La Dua Buso". La Dua Buso restartos kiel kvarmonata, 48-paĝa revuo. Ĝin redaktos Miyamoto Masao kaj eldonos, kiel antaŭe, Saito Eizo.

NEDERLANDO

● Ekfunkcios en 1983 la Regularo pri Elementa kaj Meza Ekzamenoj de UEA. Konsistigas la Internacian Ekzamenan Komisionon sep membroj, inter kiuj troviĝas Prof-o Geraldo de Matos, el Brazilo.

UEA-JARKOTIZOJ 1982

Ekde januaro validas jenaj kotizoj (v. revuon Esperanto, februaro/82, paĝo 39).

MJ - Cr\$ 1.040,00

MA - Cr\$ 2.600,00

FEDERACIA DISTRIKTO

★ La Ĉambro de Deputitoj eldonis tre bone presitan broŝuron portugale "Homenagem à Memória de Luiz Lázaro Zamenhof, Criador do Esperanto" kun paroladoj de Deputitoj Freitas Nobre, Antonio Morais kaj Vasco Neto en la speciala sesio okazinta la 24an de septembro 1981 omaĝe al la kreinto de Esperanto. BKE adresis al la Ĉambro gratulleteron kaj sugeston, ke oni publikigu ĝin ankaŭ en Esperanto por montri al la mondo tiun gravan laboron de brazilaj parlamentanoj.

★ Kun plezuro ni registras kaj dankas la aniĝon al BKE de la sekvantaj novaj individuaj membroj: Elma do Nascimento, Marconi Henrique de Gonçalves, Dulce de Paiva Whately, Willy do Nascimento Sales, Marcelo Whately Paiva, Paulo Gitahy de Alencastro, Gert Drucker, Cleusa Maria Leone Cezar, Arlindo Barauskaite Vasiusas, Ary Zamora, Adolpho de Miranda Silva, Orlando José Lopes Jr., Oswaldo Leite de Moraes, Balbina Ferreira, Luiz de Magalhães Cavalcanti, Elísio da Rocha Dorea, Ana Maria Gedeão Dantas, Eluizio Bueno Rodrigues, Max Victor Egon Ramm, José Saraiva Matos kaj Ivo Sanguinetti.

★ NI IRU AL KOLOMBIO! Estas temo de BEJO-cirkulero kun interesa plano por veturo al la 1^a Tutamerika Junulara Renkontiĝo okazonta kadre de la 2^a Tutamerika Kongreso en Bogoto. Adreso de BEJO: Caixa Postal 11-1110, 70084 Brasília-DF).

GOIÁS

★ En la malgranda urbo Iporá (Adreso: Rua Catalão, 341) okazis elementa kurso sub aŭspicio de Kultura Kooperativo de Esperantistoj. Ĝin gvidis nia klera s-ano D-ro Carlos Lima Melo, kiu certe ne forgesis la Zamenhofajn versojn de "Al la Fratoj": "Vi en la urbo, vi en urbeto, en la malgranda vilaĝo; ĉu ne forflugis kiel bloveto la tuta via kuraĝo?"

MINAS GERAIS

★ Instituto Esperanto de Educação (R. Guajajaras, 410 s/810 - Belo Horizonte) akurate publikigas sian mimeografitan informilon (jam la 4^a!) kun interesaj novaĵoj kaj grava alvoko: "Se vi apartenas al

tiuj, kiuj iam lernis Esperanton kaj nun sin kredas malkapablaj iom aktivi, ni konsilas al vi vekiĝi el via movada dormemo kaj fari ion tiusence".

Rim.: Ni gratulas IEE-anojn kaj trovas la alvokon tute prava, ĉar post kvin jaroj - 1987 - okazos la 100-jara Jubileo de Esperanto!

SANTA CATARINA

★ Ni jam raportis (laŭ informo de s-ano G.O.Vaske) koncerne la simpaton de maŝvesta Fabriko Malwee por Esperanto. Nun li plue informas, ke tiu industrio povos interesiĝi fabriki cemiĝojn k.a. (sugestoj bonvenas) por pli brili la centjarfeston de Esperanto. Adreso: Rua Bertha Weege, 20 - 89250 Jaraguá do Sul - SC.

SÃO PAULO

● Sub la respondeco de Esperanto-Asocio de San-Paŭlo, kun apogo de la Sekretariejo pri Kulturo de São José dos Campos, okazos en tiu urbo, en la fino de majo, la 8a San-Paŭlo Esperanto-Renkontiĝo. Prelegoj, debatoj, arta vespero, konkurso pri tradukado kaj promenado estos programeroj de tiu aranĝo, kiu celas la diskonigadon de Esperanto. Ĉirkaŭ 80 personoj jam aliĝis al ĝi. La urbestro de São José dos Campos estos ĝia patrono. Senpagan loĝadon povos havi 50 personoj. Jen la plenuma komitato de tiu evento: Prezidanto: Elvira Fontes; vicprezidanto: Miguel Rodrigues; ĝenerala kunordigato: Roberto Lettière; asessoroj: Amélia M. Hamada, José L. Ferreira, Maria A. Ladalardo kaj Majoro Gilberto Aquino da Silva Velho.

● Danke al laboro de la senlaca batalanto D-ro Osvaldo Pires de Holanda, fondiĝis la Esperanto-Grupo "Adolfo Bezerra de Menezes", kies estraro oni solene enoficigos la unuan de majo 1982, en la sidejo je Rua Omachá, 182. Prezidos la novan societon la junulo Domingos José dos Santos, kaj D-ro Holanda estos la kasisto.

● MOVIMENTO ESPERANTISTA DA PUCC aktivas per diversaj kursoj organizataj de gestudentoj de tiu katolika universitato en la urbo Campinas (Instituto de Letras da PUCC - Rua Barreto Leme, 1125).



EL LA GAZETARO

★ **DIARIO POPULAR** (San-Paŭlo) - Ankoraŭ foje evidentiĝas la grandega laboro de San-Paŭla Esperanto-Asocio kaj ĝia Prezidantino Elvira Fontes. Tiu populara ĉiutaga ĵurnalo publikigas rubrikon "Lingua Internacional" kun varia informado inkluzive de noto pri la Bulteno de BKE kaj ĝia enhavo.

★ **BOLETIM INFORMATIVO** (Rua Djalma Dutra, 28 - 24030 Niterói-RJ) - Novaĵa bulteno de Grupo Espirita Francisco de Assis, aperigas artikolon de s-ano d-ro Joaquim de Couto sub la titolo "Esperanto".

★ **JORNAL DO VALE** (Volta Redonda-RJ) - Prezentas artikolon de s-ano V.P. Werneck pri reformo de la portugallingva ortografio; tiam li faras komparojn kun la simpleco de Esperanto.

★ **O SEMEADOR** (C. Postal 8763 - 01000 São Paulo-SP) - La periodaĵo de Spiritisma Federo de Ŝtato San-Paŭlo en la numero 452 enhavas poeziaĵon en Esperanto, anoncon pri E-kurso en ĝia side-

jo kaj interesan artikolon pri Prof. Emile Boirac - konata esploranto de parapsikologio kaj grava esperantisto, prezidinto de la Unua Universala Kongreso. -

★ **A CANDEIA** (Caixa Postal 40-0074 - 72000 Taguatinga-DF) - La oficiala organo de FREL, gvidata de s-ano Prof. Euripedes do Nascimento, ĉiam aperigas ion pri la Lingvo Internacia. (Estas petate, ke oni sendu materialon por publikigo). FREL estas esperantista edukejo aliĝinta al BKE kaj havas en sia programo la disvastigon kaj instruadon de Esperanto.

★ **BRASÍLIA** (Caixa Postal 07-0467 - 7000 Brasília-DF) - Bela revuo eldonata en la brazila ĉefurbo, prezentas en la n-ro Aprilo/82 artikolon de s-ano Luiz Caldeira pri Esperanto kaj la 66^a UK.

★ **SINTESE** (Rua La Salle, 22 - 24000 Niterói-RJ) - Oficiala organo de UPPE - asocio de profesoroj - ofte publikigas materialon preparitan de la senlaca Prezidanto de Niterói Esp. Klubo, D-ro Joaquim do Couto.

★ **NOVE DE ABRIL** (Rua 21 nº 10 s/ 337 - 27180 Volta Redonda-RJ) - Monata gazeto de Companhia Siderúrgica Nacional, kie laboras kelkaj esp-istoj varbitaj de nia malnova amiko Inĝ. Alberto Flores, pioniro en tiu urbo. La Sekretario de V.R. E-Klubo, Inĝ. V. P. Werneck, inteligente bruegas pere de tiu periodaĵo, kaj ankaŭ publikigis trafan tradukaĵon de artikolo de Shuichi Yamakawa aperinta en la n-ro 911 de la revuo Esperanto.

PLIBONIGU VIAN VORTPROVIZONI

Indiku la literon kiu montras la korektan signifon de la subaj vortoj. Se vi ne sukcesas montri la ĝustan signifon almenaŭ trifoje, la vortaron vi devas legi kun pli da ofteco. Je la paĝo 8a vi povas kontroli la korektajn respondojn.

I - KANOTO

- a) maldekstrulo
- b) boato
- c) maldekstra parto de ĉeklibro

II - KATUNO

- a) bandito, ŝtelisto
- b) kotona teksaĵo
- c) antikva greka mezurunuo

III - VOKTO

- a) Kontrolisto
- b) voĉdonilo
- c) ruslanda Trinkaĵo

IV - FAKOĈERO

- a) faka sektoro de iu entrepreno
- b) komerca kontoro
- c) porko el Afriko

V - MESPILO

- a) manĝebla frukto
- b) fonto de energio
- c) elektra kandelo ornamanta altaron

VI - MARMOTO

- a) motoro por sportaj boatoj
- b) interna maro en Azio
- c) mambesto, kiu dormas dum la tuta vintro.

KIU ROLIS KION, EN LA 66a UK

Uzante la supran rubrikon, la lasta revunumero de Impulso (jan/jun-82) aperigas tre interesan artikolon, kies tria paragrafo tekstas jene: "Kiam oni parolas pri la 66a UK, nepre menciindas nomoj kiel de la Ministro Said Farhat, Senatano José Lins Albuquerque, S-ino Maria Nise S. Lins Albuquerque, D-ro Nid Dutra D' Amorim, Gesinjoroj Guisepe kaj Úrsula Grattapaglia, Brazilia Esperantista Junulara Organizo (BEJO), kaj Esperanto-Asocio de Brazilio (EAB)".

Ĉar inter la juraj personoj oni forgesis menci aliajn instituciojn, kies kontribuo al la sukceso de la kongreso estis same grava, almenaŭ rilate al Brazilia Konsilantaro de Esperanto (BKE) ni montru kion ĝi rolis en la kadro de tiu evento.

BKE estis la nura E-organizaĵo en nia lando, kiu sin preparis por akcepti la organizantojn de la 66a UK en sia sidejo, kies aĉeto, kun tia ĉefa celo, estis rezulto de neforgesebla tutlanda kampanjo lanĉita en februaro 1979.

Por disponigi komforton al la membroj de LKK, dum la periodo marto/80 ĝis januaro/82, BKE malplenigis la ŝrankojn kaj tirkestojn el sia sidejo kaj metis en la hejmojn de du direktoroj ĉiujn dokumentojn konsistigantaj la arkivon de la asocio. Tio signifas, ke BKE zorgis prioritare pri plej bona funkciado de LKK-oficejo, ol de sia propra interna aktiveco.

La plej altvaloraj kontraktoj (ekzemple, pri starigo de telefona reto en la kongresdomo, lupreno de elektraj kopiiloj, provizado de la kongresejo je mirerala freŝa akvo k. t. p.), estis subskribita de BKE, ĝuste por tio, ke Telecomunicações de Brasília S.A. - Telebrasil kaj aliaj firmoj postulis, ke la kontraktoj pri servoj havu la subskribon de jura persono finance kaj ekonomie kapabla, laŭleĝe registrita en la Ministerio pri Fiancaĵ Aferoj kaj kun banka tradicio en Brazilio, kondiĉoj kiujn nur BKE povis plenumi.

Tiu ĉi Bulteno, dum pli ol du jaroj, farigis la heroldo de la 66a UK, kio certe iel kontribuis al la atingo de rekorda nombro da kongresaliĝintoj, kompare kun tiu de la ceteraj UK-oj realigitaj ekstereŭrope, ekde 1905.

Multajn aliajn kontribuojn oni povus menci, por montri kion BKE rolis en la 66a UK. Tamen, por fini la liston, verŝajne sufiĉas informi la legantojn, ke en la loka kongresa komitato iam partoprenis kvin membroj intime ligitaj al BKE: du estraranoj kaj tri vicprezidantoj, ĉi-lastaj nuntempe konataj kiel delegitoj, pro BKE-statutŝanĝo okazinta en novembro 1981.

Loka Kongresa Komitato
Carlos A. Cunha
Kasisto



LETEROJ RICEVITAJ

* *Plezure ni salutas la novan Estraron de BKE kaj deziras fruktodonan laboradon. Dio helpu vin, por ke vi sukcesu enkonduki BKE-on kiel unuig-forton en nia lando (Barra Mansa Esperanto-Klubo).*

* *Resti flanke de tiu vigla E-Movado estas neeble al mi, kiu multe amas nian Karan Lingvon. Mi rimarkas, ke BKE en la daŭro de malmulte da tempo multe faris por nia E-Movado . . . (Godofredo de Araujo Goes-Salvador-BA)*

* *Tre interesa estas la unuapaĝa informo "Brazilo, la unua en la Mondo". Tiu sukceso ŝuldiĝas al la sindediĉa laboro de ĉiuj brazilaj esperantistoj. NUR LA AMO SAVOS LA TERON! (João M. Aguilera Jr., Campinas-SP).*

* *Kun miaj sinceraj, varmaj gratuloj al vi, nova prezidanto de BKE, kaj al viaj kompetentaj kunlaborantoj, kiuj tiel signifoplene, venke, laboras por Esperanto . . . (Yolanda de Araujo Costa, R.Janeiro-RJ)*

BALANCETE DE VERIFICAÇÃO DO RAZÃO – MARÇO 82

DÉBITOS

CAIXA	Cr\$	22.950,00
BANCOS	Cr\$	79.688,02
BENS RECEBIDOS EM DOAÇÃO	Cr\$	7.000,00
IMÓVEIS	Cr\$	320.000,00
MÓVEIS E UTENSÍLIOS	Cr\$	28.400,00
PARTICIPAÇÕES	Cr\$	5.000,00
DESPESAS COM O BOLETIM INFORMATIVO	Cr\$	43.256,50
DESPESAS COM A SEDE PRÓPRIA	Cr\$	14.749,37
DESPESAS GERAIS	Cr\$	33.965,00
DESPESAS LEGAIS	Cr\$	4.672,00
PROMESSAS E REGISTRO DE DONATIVOS PRÓ SEDE	Cr\$	562.600,00
		1.122.280,89

CRÉDITOS

FUNDO SOCIAL	Cr\$	429.942,85
ANUIDADES	Cr\$	76.800,00
DONATIVOS PARA O BOLETIM	Cr\$	22.920,00
DONATIVOS PRÓ SEDE-PRÓPRIA, RECEBIDOS	Cr\$	5.500,00
CONTAS CORRENTES U.E.A.	Cr\$	6.700,00
CONTAS CORRENTES B.E.J.O.	Cr\$	300,00
CONTAS CORRENTES CARLOS A. S. CUNHA	Cr\$	15.436,32
CONTAS CORRENTES F. S. ALMADA	Cr\$	450,00
CONTAS CORRENTES JOSÉ C. D. RAMOS	Cr\$	1.631,72
DONATIVOS SQB COBRANÇA	Cr\$	9.000,00
DONATIVOS COBRADOS	Cr\$	553.600,00
		1.122.280,89

DONATIVOS PARA O BOLETIM INFORMATIVO

POSIÇÃO ATÉ 31.03.82

01 - A.A. ANTUNES JUNIOR	Cr\$	1.000,00
02 - ANTONIETA ALMADA MIRANDA	Cr\$	1.600,00
03 - CARLOS KUNDE FILHO	Cr\$	200,00
04 - CLAUDIO ZIMMERMANN	Cr\$	600,00
05 - DILERMANDO TEIXEIRA	Cr\$	300,00
06 - FRANCISCO DE SOUZA ALMADA	Cr\$	2.520,00
07 - HOTEL DAS NAÇÕES	Cr\$	5.000,00
08 - HERSILIA VALVERDE	Cr\$	500,00
09 - HUGO FÓSCOLO	Cr\$	800,00
10 - JOSÉ DIAS PINTO	Cr\$	800,00
11 - LUIZ ANTONIO LOYOLA	Cr\$	500,00
12 - MANOEL BORGES DOS SANTOS	Cr\$	300,00
13 - MODESTO BELMONTE DE ABREU	Cr\$	2.200,00
14 - REPRESENTAÇÕES BRANDT LTDA	Cr\$	5.000,00
15 - SALVADOR RAYMUNDO	Cr\$	1.000,00
16 - VICENTE PAULO WERNECK	Cr\$	600,00
		22.920,00

José Carlos Dorini Ramos

TESOUREIRO:

GUTOJ GRAMATIKAJ...

Prepozicioj.

Ĉiuj prepozicioj (sur, en, ĉe, inter k. t. p.) havas firman senco kaj ne estas uzeblaj en alia senco ol ili origine havas. Tiel ne estas en la naciaj lingvoj, kie la sama prepozicio ofte povas havi diversajn signifojn, depende de la kunteksto. Ekz, en kelkaj lingvoj oni diras "sur la stacio" anst. "en la stacio", "sur Esperanto" anst. "en Esperanto", "mi pensas sur vi" anst. "pri vi", k. t. p. Tial oni ne povas laŭvorte traduki la nacilingvajn prepoziciojn, sed oni devas ĉiam elserĉi ilian logikan signifon kaj traduki ĝin. Jam sole pro tio ĉi Esperanto estas multe pli facila ol kiu ajn nacia lingvo, ĉar en Esp. la uzado de la prepozicioj estas tute logika kaj regula kaj oni ne bezonas lerni parkere ĉiun unuopan esprimon.

La kazo post la prepozicioj.

Ĉiuj prepozicioj per si mem regas ĉiam nominativon: en mi, al vi, kun ŝi, sen li, sur la tablo, sub la benko, k. t. p. Kelkfoje kun la prepozicioj estas uzata ankaŭ akuzativo, sed tio ne dependas de la prepozicio, sed de aliaj kaŭzoj, kaj en tiaj okazoj akuzativo estus uzata ankaŭ sen prepozicio.

Direkto.

Komparu la frazojn:

Petro estas hejme.

Petro iras hejmenN.

Li estas tie.

Li iras tieN.

La vortoj "hejme" kaj "tie" indikas lokon, kie la persono troviĝas, dum "hejmenN" kaj "tieN" montras la celon aŭ direkton, al kiu li moviĝas: li ne estas hejme, sed li iras en la direkto de la hejmo (= hejmen). Tiun celon aŭ direkton, transiron de unu loko al alia, montras la finaĵo "-n", kiu signas ja ankaŭ la celon de la ago ĉe la transitivaj verboj. Temas do fakte pri la sama akuzativo!

PLIBONIGU VIAN VORTPROVIZON

La korektaj signifoj estas jenaj: I - b; II - b; III - a; IV - c; V - a; VI - c.

Indikante transiron de unu loko al alia, oni devas kompreneble uzi ankaŭ verbojn de movo: iras, kuras, flugas, naĝas, metas, ĵetas, veturas, vojaĝas, rapidas, k. t. p. Ne estas grave, ĉu ili estas transitivaj aŭ netransitivaj.

La sama rilato kiel supre estas ankaŭ inter la frazoj.

La kraĵono estas en la poŝo

La ĉapelo estas sur la kapo

kaj

Mi metas la kraĵonon en la poŝonN

Mi metas la ĉapelon sur la kapoN.

La unuaj frazoj montras la lokon, kie la kraĵono kaj ĉapelo troviĝas, dum la lastaj du indikas ilian transmeton al nova loko. "En la poŝonN" kaj "sur la kapoN" havas la azuzativajn finaĵojn ne pro la prepozicioj "en" kaj "sur", sed pro tio, ke ili esprimas celon de movo. Kaj la vortoj "Kraĵono" kaj "ĉapelo" estas akuzativaj, ĉar ili estas reketaj objektoj de la transitiva verbo: "metas".

Do ni vidas, ke la akuzativo estas uzata por du celoj: 1. por montri celon (objekton) de ago kaj 2. por indiki celon (direkton) de movo. La esenco estas la sama.

PLUJAJ EKZEMPLOJ:

1. **Loko:** La lernanto estas en la lernejo. La libro kuŝas sur la tablo. Muso sidas sub la lito. Ŝi iris apud sia edzo. La seĝo staras antaŭ la piono. Arbo kreskas malantaŭ la domo. La vagonaro veturis inter montoj. La dometo staras trans la rivero. La mastro laboras ekster la domo. Aeroplano flugis super la urbo.

2. **Celo de movo:** La lernanto iras en la lernejon. Mi metas la libron sur la tablon. Muso kuris sub la liton. Ŝi iris apud sian edzon. Li metis la seĝon antaŭ la piono. La fremdulo iris malantaŭ la domon. La vagonaro enveturis inter la montojn. La birdo flugis trans la riveron. La viro iris ekster la domon. Flugmaŝino venis super la urbon.

RIMARKO: Atentu, ke la verboj de movo ne ĉiam indikas movon (transiron) de unu loko al alia, sed povas montri ankaŭ movon en la sama loko: Mi iras en la ĉambro = mi estas en la ĉambro kaj ĉirkaŭiras tie. La birdo flugis trans la rivero = la birdo jam estis trans la rivero kaj flugis tie.

(El La Tuta Esperanto, Literatura Mondo, Budapeŝto, 1938)